

Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĝaudon la 3-an de novembro 2022 per Zoom

Ĉeestis

Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget, Vidar Skretting, Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 29-an de septembro 2022

La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Esperantonia

Claude informis, ke ni ne estas en tia profunda ekonomia krizo, kiu postulus tujajn drastajn agojn. Ni povas konservi Esperantonia-n ankoraŭ kelkajn jarojn, kaj laŭ ia ekonomia vidpunkto tio eĉ ne estas la plej malbona el la aktualaj alternativoj.

Marianne kontaktos la klubon de Oslo por proponi komunan kunvenon la 21-an de novembro por diskuti la sorton de Esperantonia.

Claude esploras la proceduron pri vendo de akcioj en Skagenfondene. Eble post nelonga tempo necesos vendi kelkajn akciojn por ekhavi alireblan monon.

4. Membroregistro

Lars pluesploris tri eblajn membroregistrajn sistemojn: Spond, Styreweb kaj Zubarus, el kiuj Spond kaj Styreweb ŝajnas plej aktualaj por ni. Ni komence faru novan membroliston en kalkulpaĝo (en Dropbox). Lars prizorgos la kalkulpaĝon, Marianne enmetos la membroinformojn laŭ la necesaj kategorioj. Poste eblos transigi la liston al alia sistemo, ekzemple Spond aŭ Styreweb.

5. Retaj kursoj aŭtune 2022

Marianne raportis, ke la kurso por komencantoj estis nuligita post la tria kursvespero pro malstabila partopreno, malgraŭ la fakto, ke sep personoj anoncis sian intereson pri la kurso.

6. Jarraporto 2022

Estis propono draste simpligi la jarraporton. Venontkunvene ni trarigardu la nunan strukturon de la raporto kaj decidu, kion el ĝi ni konservu.

7. Pensoj pri administraj simpligoj

Bård pripensis, kiel simpligi la funkciadon de NEL kaj faris kelkajn notojn. Ni diskutos tion dum la venonta kunveno.

8. Eventualaĵoj

Ni ricevis leteron de la administranto de la heredaĵoj de Ester Olsen (Korgen), en kiu estas skribite, ke la domo povus valori 3-400.000 kronojn. Makleristo proponas vendi ĝin kontraŭ pago de 100.000 kronoj. Bård telefone esploras, ĉu ni povas peti prezproponojn ankaŭ de aliaj makleristoj.

9. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 5-an de decembro je la 20-a horo.

Protokolis Marianne Lund